

FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 24 Eberswalde 1991-11-15

1. Pri la terminologia/vortara laboro de IFRE (Julio 1991)

1.1. Ĝeneralaj rimarkoj

Ekde 1991 grupo da forstistoj, anoj de Internacia Fortista Rondo Esperantlingva kaj anoj de Ĉambro de Tekniko de la iama Instituto pri Forstsciencoj Eberswalde laboras pri la preparo de multlingva fakvortaro por la forstmastrumado surbaze de difinitaj nocioj.

Oni elektis la plej gravajn ĉ.1000 nociojn el la faksekcioj silvikulturo, forstprojekto, forstaranĝado kaj forstutiligo . La nocioj estas difinitaj en la Esperanta , angla kaj germana lingvoj.

La difinoj estas interplektitaj laŭ terminaro. La ĉefa parto de la vortaro enhavu la 1000 nociodifinojn kun iliaj nomoj/ fakvortoj en ĉ. 20 lingvoj . La sinsekvon de la nocioj oni faris tiutempe ankoraŭ laŭ kuranta kvarcifera labornumero . Krome la kapa linio de ĉiu nocio enhavas kaj okciferan numeron apogitan sur la Forsta Decimala Klasikado (FDC), kaj la konvena(j)n numero(j)n de la "Terminology" de Ford-Robertson, se ĝi enhavas tiun nocion.

La aldona parto enhavu – aparte por ĉiu lingvo – alfabetan liston de la termino-ekvivalentoj de la ĉefa parto. La kvanto de la kapvortoj por unu lingvo pleje estas inter 1000 kaj 2500.

La difinoj kaj iliaj termino-ekvivalentoj en la diversaj lingvoj estas enmemorigitaj kiel simplaj teksto-datenaroj en la ASCII-kodo sen regad-signoj. Ĉiujn literojn , kiuj transiras la anglan alfabeton, oni kodes per numeroj. Estas farita malkodad-programo kun la konformaj signaroj kadre de la programaro SIGNUM2 por Atari-komputiloj kaj 24-pinglaj skribiloj.

La manuskripto aŭ la presmodelo por la libro estu pretigita fine de 1991 por prezenti la kreaĵojn dum la IUFRO-kongreso venontjare. Ĝis nun la projekto estas prilaborita de la germanoj kaj eksterlandanaj kunlaborantoj senpage kaj eksterofice.

La ĝisnunaj intertraktoj kun eldonejoj montris, ke tia vortaro apenaŭ estas eldonebla sub nur merkatoekonomiaj vidpunktoj. Oni kalkulas, ke sole la eldoneja farp estu subvenciota per 150 000 DM. Nuntempe ni korespondas kun s-ro Kempf (Birmensdorf, Svisio), kunordiganto de la IUFRO-komisiono S6.03., ĉu oni povos eldoni la verkon kadre de IUFRO World Series.

1.2. Pri kelkaj detalaĵoj de la terminologia/vortara laboro de IFRE:

En nia terminologia/vortara laboro ni paŝas laŭprincipe alian vojon ol ĉe "Terminology de Ford Robertson". Elirpunkto ĉe ni estas nocio de fakto kaj ne esprimo, termino. La nocioenhavon oni indikas per difino. Ni provas plejeble konformigi la difinon al la internacia forsta nokia mondo. Tio kompreneble postulas internacian kunlaboron kaj pretecon al kompromisoj. La forstistoj de la diversaj lingvoj elektas konforme al indikita difino la esprimon el sia etnolingvo (nacia lingvo). Povas esti kelkaj esprimoj, "preskaŭ-sinonimoj", arkaikaj esprimoj aŭ preskaŭ parafrazo, se mankas konvena esprimo. En la plej multaj lingvoj bedaŭrinde ne ekzistas terminaro – en la senco de scienca terminaro – pri la forstfaka lingvo. La terminologia scienco postulas: "Unu terminon por unu nocio kaj termino havu nur unu nocioenhavon." Tio estas postulo, kiu ankoraŭ necesigas en multaj lingvo altan engaĝon de rilataj forstistoj. Tion oni povus realigi plej bone post internacia interkonsento pri nocioenhavoj. Pri tio la

S6.03-komisiono povus ludi gravan rolon. – En la elektrotekniko kaj kemio oni jam progresis en tiu ĉi kampo.

Elirante de tiu ĉi koncepto pri la termina/vortara laboro, ni proponis adekvantan ordigad-sistemon por la terminoj (vd. “Beiträge für die Forstwirtschaft” 24(1990)3; SIMON, K.H., ULLRICH, I.: “Propono pri la klasifikado de terminoj en la sfero de la forsta fako” – “Vorschlag zur Klassifizierung von Termini auf dem Gebiet des Forstwesens” – (Forstista Informilo n-ro 20 1990. Aldono n-ro 4). Laŭ tio ni apogas nin sur la Oxford-sistemo (nun FDC) ĝis la kvara cifero. Estus ankaŭ imagebla ankoraŭ pli detala uzado de la FDC-numeroj. Ni elektis ok ciferojn inkluzive de la proponitaj kvar aldonaj ciferoj. Tiel oni povas enmemorigi la nocion “mezarbaro” kiel “222.1.01.22.TXT”- datenaron, la nocion “stratifiki” kiel 232.3.14.77.TXT-datenaron.

Do, ĉe nia agadmaniero ĉiu esprimo, ĉiu nomo por nocio – egale en kiu ajn lingvoj – ne havas specialan numeron, kiel tiu ĉi estas ĉe la IFTN-numero laŭ Yerke, Berkeley California. Sed ĉiu nocio, fiksita per sia difino, havas propran numeron. Nocioj, kiuj diferencas nur per sia gramatika formo, distingiĝas nur en la lasta loko de la okcifera numero. Nocioj, kiuj diferencas en la kategorio de la fundamentaj ideoj, havas jam en la antaŭlasta loko diferencojn. Ekz. la nocio de “kroĉulo” havas la numeron 323.1.12.20, “kroĉi” la numeron 323.1.12.72. “Kroĉado” estas 323.1.12.70. “kroĉita” 323.1.12.71. Ĝis tiu punkto al la aldonita publikaĵo kelkajn klarigojn:

Pro praktikaj konsideroj de la prilaborado de vortaro, planita kiel rezulto de la laboro de la IFRE-grupo, niaj nocioj estas ekipitaj per kvarcifera labornumero, kiu estas hazarda rilate nociojn kaj iliajn nomojn. Ni intencas konservi intertempe tiujn labornumerojn. Ĉar ili estas pli komfortaj kiel serĉnumeroj dum la listigo de la esprimoj/terminoj ol okciferaj numeroj.

Por la vicigo de la lingvoj en nia vortaro ni apogis nin sur la sinsekvo de la UDC-indiconumeroj. La mallongigoj por la lingvoj konformas al “International Standard ISO 639”.

Bedaŭrinde mankas ĝis nun forstistoj kun angla gepatra lingvo por kontroli la anglan parton de nia verko. Ankaŭ por la hispana kaj portugala lingvoj, disvastiĝintaj en diversaj landoj ankoraŭ pli da kunlaborantoj estas dezirindaj. Spite de multaj malperfektaĵoj ni klopodas pretigi ĝis la jarfino la manuskripton de la unua parto de la planita vortaro, de la unuaj ĉ. 1000 nocioj.

La gvindlingvo por la planita verko estas la planlingvo Esperanto. Nur per tiu ĉi lingvo ni povas plenumi la postulojn, kiuj estas farotaj al scienca terminaro. Por la aliaj lingvoj povas esti nur listo de fakvortoj.

Elirpunkto pri la serĉo de konvenaj fakesprimoj estas la difino de nocio en Esperanto. En tiu ĉi lingvo oni povas senmiskrompreneble esprimi la nocioenhavojn laŭ la ĉi tie necesa koncizo. La difinoj en la angla kaj germana lingvoj prezentu plej bone eblan tradukon de la Esperantlingva difino. Tradukoj de la difinoj en pliajn lingvojn estas dezirindaj, sed probable ne baldaŭ fareblaj. La difinoj laŭprincipe estas metitaj inter rektaj krampoj. Same aliaj klarigoj staras inter rektaj krampoj, ekz. la teritoria disvastiĝo de fakvorto.

Por la indiko de landnomoj ni preferas la “Alpha-3-code” de “International Standard ISO 3166”.

Diversajn fakesprimojn por unu nocioenhavo oni disigas per semikolo. La sinsekvo de fakvortoj en unu lingvo oni faru tiamaniere, ke la plej rekomendindaj staru antaŭ la malpli bonaj. Por esprimoj kun postmetita aldona signo validas la sekvanta:

1. # esprimo, kiu estas nur preskaŭ sinonima al la difino
2. > esprimo en pli vasta senco ol la difino
3. < esprimo en pli malvasta senco ol la difino
4. + arkaika aŭ antikviĝinta esprimo
5. () esprimo estas uzebla nur en ekstrema kazo

Se en iu ajn lingvo mankas fakesprimo por nocio, oni elektu parafrazon, kiu konvenas al la nocioenhavo.

Ĉe esprimo, kiu konsistas el pluraj vortoj, la kapvorto havas la unuan lokon, kaj en normala frazo antaŭstarantaj vortoj sekvas, disigitaj per komo je la fino de la esprimo. Tiel ĉe esprimo por iu aĵo la substantivo havas la unuan lokon kaj necesa adjektivo la duan, ekz. "sekcio , krudligna". Tiu agadmaniero garantias, ke ĉe la alfabeto listigo de fakvortoj unue la kapa vorto determinas la sinsekvon.

Per oblikvaj strekoj estas ĉirkaŭitaj la indikoj pri la deveno de esprimo. Ĉe tio publikaĵojn oni indikas per mallongigo el majuskloj laŭ nia "Bibliografio de arbarmastrumada literaturo". Proponojn ĝis nun ne publikigitajn oni markas per minuskloj. La indikoj pri deveno estos forlasitaj en la fina formo de la vortaro.

La rondajn krampojn oni uzas escepte de la supre nomita kazo (uzeblo nur en ekstrema kazo) ankaŭ por ellaseblaj literoj, silaboj kaj vortoj aŭ en difino por ne nepre necesaj partoj de la difino.

La asterisko (*) malantaŭ de fakesprimo atentigu pri tio, ke por tiu esprimo oni trovas difinon en alia loko de la vortaro.

Laŭ la kondiĉoj por terminaro oni difinas ĉiun nocion laŭeble en singulara formo.

Por lingvoj, en kiuj genro ludas rolon, oni indikas tiun per respektiva mallongigo (nur malantaŭ la gvidvorto). Tio validas ankaŭ por la markado de verboj., se ili necesigas la indikon "netransitiva" (ntr).

Verbojn oni citas, kiel tio estas ĝenerale uzata en ordinaraj vortaroj, t.e. en la plej multaj eŭropaj lingvoj, en infinitiva formo.

Kaŭze de ŝparado de elspezoj ktp. oni laŭeble uzas por ripetiĝantaj vortoj aŭ vortpartoj la ripetsignon (~). Ĝi ripetas la n-an vorton de la antaŭa esprimo. Ĉe la nombrado de la vortoj ligstreko (-) aŭ vertikala streko (|) efikas kiel spaco inter du vortoj.

Ĉar komence de la laboro estis disponeblaj sur komputiloj nur la literoj de la angla alfabeto , ĉiuj diakritaj signoj kaj specialaj literoj estis koditaj per antaŭmetitaj nombroj (vd. kodotabelon). Tiun ĉi agadmanieron ni dume daŭrigos, ĉar ĝis nun ne estas alia kontentiga solvo. Per speciala malkodadprogramo pli malfrue la presado okazos laŭ la necesaj literoj.

2. Pri la kunveno de IFRE-anoj okaze de la IUFRO-kongreso en Berlin/Eberswalde.

Laŭ la unua informo de la organiza buroo de IUFRO la kongreso komenciĝos je la 30a de aŭgusto 1992 per la registrado de la partoprenantoj . Post solenaĵoj kaj plenkunsidoj je la 31a de aŭgusto kaj 1a de septembro estos je la 2a kaj 3a de septembro i.a. aranĝadoj de la IUFRO Subject Group Terminology and Information Systems. Je la 4a de septembro oni aranĝos unutagajn ekskursojn (prezo ĉ 75 DM). Ĉiu interesulo sendu la provizoran aliĝilon al la organiza buroo kaj kopion ankaŭ al mia adreso. Laŭ tiuj aliĝiloj ni proponos programon, kiu sufiĉu al la plimulto de la interesuloj, do ankaŭ al tiuj, kiuj ne povas partopreni en la IUFRO-kongreso, sed nur en IFRA-anaj forstterminologiaj kunsidoj, ĉefkunsido kaj specialaj ekskursoj por esperantistoj.

K.-H. Simon

fake kaj lingve reviziis: Ingward Ullrich